

**Kluba Programo:****septembro:**

- 2 Babil-vespero (IBIS)  
 9 **Lud-vespero (Diorama)** Matt Peperell  
 16 Babil-vespero (IBIS)  
 23 **Lingva Seminario** - John Wells (**Diorama**)  
 (1800h: konsilantaro)  
 30 Babil-vespero (IBIS)

**oktobro:**

- 7 Babil-vespero (IBIS)  
 14 **Raportoj pri Kongresoj** kaj aliaj Esperantaj  
 Renkontiĝoj - Klubanoj (**Diorama**)  
 (1800h: konsilantaro)  
 21 Babil-vespero (IBIS)  
 28 **Vizito al restoracio** (Nepre legu *ĉi*-sube !)

**novembro:**

- 4 Babil-vespero (IBIS)

**Komuna manĝo, 28-an de Oktobro 2016**

ĉe **Pizza Express**, 125 Alban Gate, London Wall,  
 London, EC2Y 5AS

Ĝi situas super la strato London Wall, je kruciĝo kun  
 Wood St, je la suda rando de la konstruaĵaro Barbican

(Mapojn bv. trovi sur aparta folieto – ne perdu ĝin!).

**Metreo:** Barbican, Moorgate, St Pauls Aliaj apudaj:  
 Bank, Cannon St., Liverpool St., Mansion House.

**Busoj:** - London Wall: 100: Aldersgate: 4, 56, 153:  
 Old St: 55, 243: Moorgate: 21, 43, 76, 141


Pro stratlaboroj (precipe kulpas Crossrail), kelkaj  
 bushaltejoj estas fermitaj, kaj kelkaj busoj devojiĝas

Se vi intencas partopreni, bonvolu anonci vin antaŭ la  
fino de septembro al Arturo Prent <ap\_esp-  
 lek21@yahoo.co.uk>, 01277 228962. (poste restos  
 ebleco, sed ne certeco, tamen bv. informiĝi).

**Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron!* Se vi havas taŭgan temon kiu  
 amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la  
 program-sekretario.

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a oktobro por*  
*mencio en la sekva Kluba Bulteno.*



**Paŭlo Gubbins, 1949-2016**

Paŭlo – pli formale Doktoro Paul Phillip Gubbins – tre  
 bedaŭris, ke dum sia frua vivo li nenion sciis pri  
 Esperanto, kaj do ne havis okazon ĝui tradiciajn  
 spertojn de tiama juna movadano: membreco en JEB  
 kaj TEJO, partopreno en Internaciaj Junularaj  
 Kongresoj, Semajnfinaj Renkontiĝoj kaj alilandaj  
 Silvestrumadoj.

Tamen - aŭ eble tial – Paŭlo, post esperantistiĝo en  
 1984, estante 35-jara edzo kun tre junaj gefiloj, tuj  
 viglege ekaktivis, kvazaŭ por kompensi tiujn  
 nevolonte perditajn jarojn. En jardekoj ĝis nunaj li,  
 interalie: gajnis premiojn en Belartaj Kongresoj de  
 UEA; fondis kaj reĝisoris teatran teamon La Verda  
 Ranaro; redaktadis gazetojn *Monato* kaj *La Brita*  
*Esperantisto*; kompilis antologion *Star in a Night Sky*;  
 verkis lernolibron *Kunvojaĝŭ* kaj aŭd-vidan lingvo-  
 kurson *Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo*; gvidis  
 literaturan sektion de Akademio de Esperanto; kaj  
 estis elektita Prezidanto de EAB.

Kaj la 6an de aŭgusto 2016 Paŭlo mortis, neatendite,  
 dum dormado. Grandegan perdon spertas pro tio la  
 Esperanto-movado brita kaj tutmonda. Perdon eĉ pli  
 dolorigan suferas liaj familianoj, al kiuj ni sincere  
 kondolencas.

Ĉar Paŭlo loĝadis en Cheshire, iom for de la  
 metropolo, li neniam fariĝis membro de nia klubo.  
 Tamen li propravole lanĉis inter ni, ĉe London Irish  
 Centre, sian grandiozan libron *Star in a Night Sky*, kaj  
 tamen li afable akceptis nian inviton, nun tragike  
 neplenumotan, prelegi la 11an de novembro ĉi-jara, ĉe  
 la nova klubejo de LEK.

Li ripozu trankvile!

(Pli detalan nekrologon, kiun verkis Tim Owen, oni povas  
 legi ĉe [www.liberfolio.org](http://www.liberfolio.org); sekvu la ligilon sub “Movado”)

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:  
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,  
NW1 3FE (por kunveno kun programo);  
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por  
babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:


18:30 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la  
ĉefprogramero

22:00 fino



Loko:

Metrostacio: Euston, Warren St (Victoria linio)

Euston Square (Circle linio)

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,  
390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168,  
253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo  
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,  
Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,  
11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB  
01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Anna Lowenstein, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry\_page@btinternet.com,  
anica\_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Malfeliĉigis ĉiujn la  
lastatempa forpaso de **PAUL  
GUBBINS**, eminenta  
esperantisto de tiu ĉi lando  
kaj longdaŭra amiko de tiu  
ĉi klubo. Nepras legi la  
apudan nekrologon. Nepras ankaŭ konservi tiom da  
bonaj memoroj, pri liaj agoj, verkoj kaj laboroj por kaj pri  
Esperanto. Mi mem neniam forgesos lian paciencon kaj  
sindonemom, kiam mi demandis pri diversaj aferoj kaj  
kiam ajn mi renkontis lin - ekzemple por la ĉe-  
LEKejalanĉo de la antologio, Star in a Night Sky, antaŭ  
kelkaj jaroj. Okazis jam memor-ceremonio honore al li,  
la 19an de aŭgusto. Inter pli ol 100 ĉeestantoj, estis tri  
LEKanoj kaj almenaŭ naŭ aliaj ekster-familiaj  
samideanoj.

Nun mi menciuj feliĉigan novaĵon, pri la progreso de nia  
klubo.

Impresas min la vigleco kaj reguleco de niaj renkontiĝoj  
ĉe Hotelo Ibis. Ĉu pri literaturo ĉu pri aktualoj, la tieaj  
diskutoj ne nur interesas la partoprenantojn. Ili plialtigas  
la nivelon de la konversacio je vortprovizo kaj gramatika  
rafineco. Ĉio tio grandparte rezultas, pro ĉeesto de veraj  
spertuloj, kompreneble, kiuj meritas dankojn. Venu vi  
mem - kaj ĝuu tian etoson!

Venu ankaŭ al Diorama, por prezenti propran raporton,  
pri viaj aventuroj en Esperantujo dum la somero. Venas  
la ĉi-jara kunveno por tiaj prezentoj (kontrolu la  
programon!), kaj ĉies kontribuoj estos bonvenaj. Indas  
aŭdi de kiel eble plej vasta membraro, pri la ĵusaj  
kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj tra la mondo. Do  
partoprenu mem!

Sincere,

*David Thornell*

